Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 16/09/2021 Kvincentkvardekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*


* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 52 de "Por Komencantoj".




GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kiuj kaj kiaj frazoj estas kombinitaj de la konjunkcio en "La infanoj akompanos
sian patrinon al la parko sed ne sian patron al la butikego"?

2). Kiuj kaj kiaj frazoj estas kombinitaj de la konjunkcio "sed" en "La infanoj iros
al la restoracio kun sia patrino sed ne kun sia patro"?

3). La lastaj kvar linioj de la dua strofo de "La Espero" tekstas jene":

"Forte staras muroj de miljaroj, inter la popoloj dividitaj,
"sed dissaltos la obstinaj baroj, per la sankta amo disbatitaj."

A). En kiu senco la vorto "muroj" estas ĉi tie uzata?

B). Kial la vortoj "obstinaj baroj" ne havas ĉi tie la akuzativon?

C). Kiuj estas disbatitaj?

4). En ĉi tiu eldono de "A.E." mi kopias klarigon pri la konjunkcioj el "Plena analiza gramatiko".

Legu ĝin kaj respondu al la demando "Kiom da konjunkcioj ekzistas laŭ P.A.G.?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 458.

*Marcel Leereveld.*

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *


**Forĵetu viajn vortarojn.** Uzu *Google Translate* Kiel vortaron

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

## Entute 815,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 281,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 227,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 202,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 105,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde januaro 2022)



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



Esperanta Retradio

Biologia agrikulturo rentumas 11a sept 2021

# Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

## Artikoloj por AE.

Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

## 3ZZZ



" Por la elsendo de la 13a de septembro Heather Heldzingen elektis artikolojn rilatajn al sano :kiel legi malsanon sur vizaĝo , kiel dancado helpas la suferantojn de la malsano Parkinson.Ŝi rakontas pri la piga strepero, kiu vizitas ŝian ĝardenon kaj prezentas la ekpozicion pri Esperanto kaj la verkisto Jules Vernes, en lia naskiĝurbo Nantes." *Franciska Toubale*

# Universala baza enspezo (UBI)



Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Ĝi helpus monon flui tra nia ekomonia sistemo sen senutila laboro

Ekonomioj funkcias per la fluo de mono.

Universala Baza Enspezo ebligas ĉiujn havi monon por helpi la fluon de mono.

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

**Nur la Ĉefministro havas la rajton decidi fari militon aŭ ne**. Ne la parlamento




Amike
Petro
Danzer





Adiaŭ kara Hazel. Kvankam forpasis multaj jaroj de nia lasta renkontiĝo ie en Esperantujo, mi neniam forgesos vian belan, ĉiam ridetantan vizaĝon, kaj vian konstantan afablecon. Ripozu en eterna paco.



*Vera Payne*



*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*

# La strangaj eŭropaj lingvoj.

## KAJ TIAL ANKAŬ LA STRANGAJ KONJUNKCIOJ KAJ SUBJUNKCIOJ EN ESPERANTO.



En Esperanto, kaj preskaŭ ĉiam en etnaj lingvoj, neniam estas dubo ĉu iu vorto estas substantivo, adjektivo, verbo, adverbo, numeralo, aŭ prepozicio. Sed ĉiuj lingvistoj havas aŭ povas havi sian specialan opinion pri kio estas konjunkcio aŭ subjunkcio. Mi trovis la klarigon en *Plena Analiza Gramatiko* pli klara ol en la lernolibroj de la etnaj lingvoj. Tamen ankaŭ ĝi estas plena je necertaĵoj. Rigardu la deklinian klarigon en paragrafo 123 pri la konjunkcioj: **1).** ekzistas origine liveritaj vortoj kaj neoriginaj. **2).** Al tiuj oni "povas aldoni", do ne bezonas. **3).** Kelkaj havas la saman formon kiel adverbo, aŭ kiel prepozicio, aŭ kiel subjunkcio. En tiaj kazoj kelkaj lingvistoj juĝas ilin ne esti konjunkcioj sed esti adverboj k.t.p., aŭ eĉ ambaŭ. Sed la sama diverseco okazas en la etnaj lingvoj. Dum la disvolviĝo de la eŭropaj lingvoj oni daŭre ŝanĝis kaj aldonis konjunkciojn, sed ne plu sciis ĉu nomi ilin konjunkcioj aŭ ne.

Jen la klarigo en "Plena Analiza Gramatiko": (paragrafo 123):
" La konjunkcioj de Esp.o konsistas el origine liveritaj vortoj: *aŭ, ĉar, do, kaj, nek, nu, sed, tamen*, al kio oni povas aldoni la adverbojn *tiam, tiel, tial,* kaj la subjunkcion *dum* (vd. $ 223).

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Apud tiuj vortoj, oni uzas multajn adverbojn, kiuj havas funkcion pli malpli proksiman al tiu de konjunkcio: *alie, cetere, dume, fine, krome, male, malgraŭe, poste, same, nome, pruve, sekve,* ktp.
Aparte oni devas noti la duopajn konjunkciojn: *jen ... jen; aŭ ... aŭ; ĉu ... ĉu ...; ĉu ... aŭ ; kaj ... kaj ...; nek ... nek ...; ne nur ... sed ankaŭ ...;* kaj la adverbojn : *unuflanke...duaflanke Z ...; unuparte ... aliparte ... ; unutempe ... alitempe ...* ktp.”.

Kiel oni vidas, la tuta afero estas necerta. Ĉu ”ĉar” kaj “sed” kaj “dum” estas konjunkcioj aŭ ĉu subjunkcioj? Ĉu “nu” estas interjekcio aŭ konjunkcio? Ĉu la multaj adverboj menciitaj estas aŭ adverbo aŭ konjunkcio? Aŭ ĉu ili estas samtempe adverbo kaj konjunkcio? Kaj kion signifas ke la adverboj (kaj prepozicioj) estas “pli malpli proksimaj al la konjunkcioj”?

Post ol diri, ke “Malmulte estas rimarkinda.” (pri la uzado de la konjunkcioj), P.A.G. uzas unu kaj duonan paĝojn por diskuti kiel uzi ilin.

Pri la subjunkcioj PAG mencias ilin en nur tri linioj, sed uzas tutan paĝon por indiki kiel ne fari erarojn pri ilia uzado. Proksiman semajnon mi publikigos en A.E. la tutan paĝon, ĉar parte temas pri la rilataj pronomoj kaj iliaj antecedentoj. Nur ĉilasta temo aperas en lernolibroj, ĉar oni devas uzi la ĝustan gramatikan kazon el nominativo kaj akuzativo.

La mikspoto pri konjunkcioj kaj pri subjunkcioj en eŭropaj lingvoj (kaj Esperanto) verŝajne aperas ankaŭ en kelkaj nehindeŭropaj lingvoj, sed mi esperas ke Donald Rogers klarigos tion por ni. Antaŭan dankon! *Marcel Leereveld.*

## PERSONA SANECO.

Dum la ĵusaj du semajnoj okazis io en mia mensfunkciado, kio nun faras ke mi bezonas kvinfoje pli da tempo por verki tekstojn. Tio kaŭzas, ke mi ne povas trovi sufiĉan tempon por korespondi kun geamikoj aŭ por verki por A.E. La malsano estas relative limigita, ĉar mi plu memoras preskaŭ ĉion kio okazis kaj okazas dum mia vivo, sed mi ne povas diri malgrandan nombron necesan por diri la okazaĵojn en vortoj. La vortoj troviĝas en mia menso, sed mi ne povas ŝanĝi ilin al parolataj vortoj. Kelkfoje mi povas “kapti” la vorton en unu lingvo, sed ne kapablas uzi ĝin en aliaj lingvoj. Trovi por uzi la bezonatan vorton mi devas peni trovi ĝin dum iom da tempo ĝis kelkaj tagoj aŭ semajnoj. Nur en la malmultaj kazoj kiam mi uzpovas la vorton en unu el la lingvoj, mi povas uzi vortarojn kaj trovante la alilingvan vorton mi elkrias “Oh, jes, kompreneble!”, sed tio ne aplikiĝas al nomoj. Ekzemple antaŭ kelkaj semajnoj mi bezonis la nomojn de la ĵusjarcentaj aŭstraliaj Esperantoeminentuloj, kaj trovis nur unu. Plurajn tagojn poste mi hazarde diris ion al amiko kaj la vorto aperis sur mia lango sen ke mi serĉis ĝin: Kep Enderby. Sed la vortoj de la nomoj de la aliaj tri aŭ kvar ankoraŭ estas “ŝlositaj” en mia menso. Tiu mensa malsaneto komenciĝis antaŭ du semajnoj, kaj mia filo diris al mi ke tiaj malsanetoj kaŭzatas de la injekcioj de kontraŭvirusaj substancoj, kaj eble foriros poste. Kaj efektive tiu malsaneto komenciĝis je la sama tago kiam mi ricevis mian duan kontraŭvirusan injekcion. Ni vidos kio okazos, sed momente mi estas parte muta.
*Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

9/11 twenty years later and cheap & ubiquitous cellphones – The Greanville Post

## 9/11 dudek jarojn poste kaj malmultekostaj kaj ĉieaj poŝtelefonoj -

Se ni imagas la usonan / israelan propagandan maŝinon kiel grandega potenca besto (MILIONOJ estas investitaj en ĉi tio) vi povas pensi pri malriĉaj, subpremitaj homoj kun malmultekostaj poŝtelefonoj kiel fajroformikoj. Ni nur konkludu dirante, ke la tempo ne estas flanke de la granda potenca peza besto, sed flanke de la formikoj de fajro. —*Andrei*




**SOLVO DE LA KVIZETO 52** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1). "La infanoj akompanos sian patrinon al la parko" kaj "ne sian patron al la butikego",
La du frazoj estas kompletaj frazoj kaj kune formas kombinitan propozicion.

2). "La infanoj iros al la restoracio kun sia patrino" kaj "ne kun sia patro".
Ili ambaŭ estas kompletaj frazoj kaj kune formas kombinitan propozicion.

3). A). La vorto "muroj" estas ĉi tie uzata figurece (anstataŭ literece).
B). Ĉar ili estas la gramatika subjekto ĉe la verbo "dissaltos".
C). "la obstinaj baroj" estas disbatitaj.

4). Ok aŭ dek-du aŭ dudek-kvar aŭ tridek-unu aŭ pli.

*Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***